

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1969


## Avignon, kongresurbo en 1969

La sunoplena sudo de la franca provinco elektis en Avignon precipe allogan centron. Oni nomas Avignon ankoraŭ la urbon de la papoj, kies glora internacia epoko komenciĝis en la 14a jarcento, kiam la tuta kristanaro rigardis al la loko ĉe la Rhône-rivero. Papo Johano XXII transmetis la sidejon de la katolika hierarkio tien. Sep papoj postlasis siajn ŝpuron. La babilona kaptiteco de la eklezio translokigis la papan korton kun ĉiuj ĝiaj homoj de Romo al Avignon. La urbo ekonomie ekfloris, la antaŭzorgantaj papoj ĉirkaŭigis ĝin per muroj, kaj Benediktus XII kaj Klemens VI konstruis grandiozan kastelon, kiu tamen similas pli multe al fortikaĵo ol al palaco.

Dum cent jarojn la urbo estis centro de la kristanaro. En 1325 la juna Petrarka venis al Avignon, kie li renkontis du jarojn poste en preĝejo la belulinon Laŭra de Sades, kiun li eternigis en sia poemaro. En 1348 la pesto forrabis ŝin. Avignon, la tolerema, la papa, fariĝis la azilo de politike kaj religie persekutoj el la ĉirkaŭaj landoj, sed ankaŭejo de la komercistoj, bankistoj, aventuruloj kaj falsigistoj, ja eĉ de la publikulinaj kaj ŝtelistoj. Kaj Petrarka, kiu senlace insistis la papojn returni al Romo, amare priplendis la avidan, diboĉan vivmanieron de la korto, „kie ĉio elspiras la mensogon, la aero, la tero, la domoj kaj precipe la dormoĉambroj“.

En Avignon la pesto kelkfoje furiozis. Dufoje la urbo estas minacita per militoj, kaj dufoje la papoj devis liberigi sin de rabantaj soldathordoj pagante grandajn sumojn. Kiam Gregor IV revenis al Romo kaj mortis unu jaron poste, ekestis por

lia posteulo kontraŭpapo, kiu denove rezidis en Avignon. Nur kiam en 1403 la lasta kontraŭpapo estis forlasinta la urbon, la situacio trankviliĝis. Ĝis la franca revolucio la urbo restis sub la administrado de papa delegito loko de vivo-



La romana Ponto de la Gardo  
unu el la celoj de niaj planitaj ekskursoj

ĝojo — sed ĝi estis ankaŭ mismastrumita. La pesto de 1791 ekstermis tri kvaronojn de la enloĝantoj, kaj la brila periodo de Avignon estingiĝis.

Sed la grandioza pasinteco de la urbo restis viva ĝis nun en la forlasita palaco de la papoj, en la antikvaj preĝejoj kaj angulaj stratetoj, en la famaj konstruaĵoj, en la precioza biblioteko kaj valoraj kolektaĵoj, kaj nelaste ĝi manifestiĝis



per la genia poeto de la provinco, Frederiko Mistral.

Avignon, tiu pitoreska urbo, plena da historio, ankoraŭ nun posedas belajn domojn, kaŝitajn ĝardenojn. La mizeriĝintan aspekton de la burĝaj domoj montras la fenestroj, antaŭ kiuj pendas tolaĵoj de malriĉuloj, kiujn la furioza Mistral-vento turnigas. Sed kiu dum la krepusko promenadas sur la strato de la kanonikoj kaj rigardas tra la Rhône-rivero ĝis Ville-neuve, supozeble sentas sin translokigita en ĉiela kampo. La urban silueton destinas la kvazaŭ kastela palaco de la papoj kun siaj ok grandegaj turoj. Apude

leviĝas la katedralo de Nia Sinjorino el la 12a jarcento kaj la multnombraj monaĥejoj de la karmelita kaj celestina ordenoj. La ponto Saint-Bénézet, kies restintaj arkoj kondukas ĝis la mezo de la Rhône-rivero, estas la konata „Ponto de Avignon“, eternigita de famaj pentristoj.

Al tiu alloga urbo en Sudfrancio invitis niaj francaj geamikoj la venontan IFEF-kongreson. Kaptu tiun konvenan okazon kongresi en majo 1969 kun niaj karaj gekolegoj esperantistaj el Eŭropo. Aliĝu baldaŭ, certe vi ne bedaŭros vian decidon!

W. Barnickel

## ANKORAU EL NIA DEKDUA

Pli ol 200 geamikojn el ses landoj, kiuj komune en „Saalbau“ de Neustadt festis la 12-an Jarkunvenon, salutis k-go Hans kiel distrikta komisiito.

Prezidanto J. Gießner dankis al la samideanoj, kiuj organizis la kongreson, ĉefe al s-ro Hans kaj al s-ro Kaukal. Speciale salutis s-ro Gießner la gastojn el Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, Libanono, Svedujo kaj Svislando.

S-ro Greims salutis la kongreson nome de la direkcio Mainz, ties prezidanto kaj de la distrikta BSW-estraro. Fundamento de ĉiuj homaj kontaktoj estas la popolinterkompreniĝo. Kaj ĝi estas la fundamento por la vera paco. S-ro Greims esperis, ke la restado ankaŭ por la eksterlandanoj restos en bona memoro.

La nova estro de la kultura fako de BSW, s-ro Mäntele (Frankfurt), esprimis sian grandan ĝojon, sidi inter la esperantistaro. Li transdonis la salutojn de la ĉefestraro. „Mi promesas fari, kion mi povas fari por vi.“ Surprizis lin vizito en la interesa ekspozicio. Tial li volas provi, lerni la Internacian Lingvon. Estas impona sento, travivi la veran internacian amikecon. La esperantistoj estas sur la ĝusta vojo. S-ro Mäntele finis la paroladon en Esperanto: „Mi dankas al vi!“

La estro de la loka BSW, s-ro Jakobs, diris, ke la kunveno de GEFA en Neustadt estas granda ĝojo por la ĉi-tieaj fervojistoj. En Palatino oni ŝmiras la mondakson. Ĉiu tria aŭ kvara glaso da vino venas el Palatino. S-ro Jakobs deziris amuzajn horojn en la suna Palatino. „Antaŭ kelkaj tagoj mi partoprenis la sindikatan kongreson en Bremen“, diris s-ro Schalmey, la reprezentanto de GdED,

„kaj mi havas la komision, transdoni la salutojn de la 1-a prezidanto Seibert.“ S-ro Schalmey, kiu mem estas aktiva esperantisto, deziras al GEFA prosperon. S-ro Trommer, la reprezentanto de GDBA, transdonis la bondezirojn kaj salutojn de tiu sindikato. S-ro Trommer deziras multe da sukceso kaj bonan distraĵon por la hodiaŭa vespero.

Urbestro Meier (Neustadt) salutis nome de la urbo. Esperanto estas vere internacia lingvo. Li komparis la lingvon kun la vino. Vino estas rimedo, kiu zorgas por bona kompreniĝo en la tuta mondo. La kongreson salutis sinsekve la parolantoj de la regiona societo, GEA, SAT, IFEF kaj de la gastantaj landaj asocioj, plej multe malnovaj konatoj kaj delonge ŝatataj geamikoj. Antaŭ ol oficiale transdoni la taskojn al la nova estraro, s-ro Gießner memoris la pasintajn 12 jarojn, pensante pri la tiam vere modestaj rimedoj de la asocio. „Tamen, konsiderante la manplendon da bonvolaj helpantoj, oni povas esti kontenta pri la progreso.“ Elkore li dankis la kunlaborintojn pro la sindona servo al nia komuna celo kaj pro ĉiom da amikeco, kiun donacis al li tiu ĉi posteno. Prezidanto Gießner poste esploris kaŭzojn de kelktempa stagnado kaj kiel lastan agon en la malnova ofico li prezentis la estraron laŭ nuna konsisto. La nova 1-a prezidanto Brandenburg koncize skizis kelkajn ideojn pri kontinua daŭrigo de fruktodona kunlaboro. Li finis kun esprimo de danko kaj amika respekto al sinjorino Kruse kaj sinjoro Gießner. „La transdonitaj 12 ruĝaj diantoj simboligu la dekdu jarojn de via laboro. La gravurita bildo memorigu la urbon de via „emeritiĝo.“ S.



## Novaj veloj sur provita boato.

Kiel valora perlo en digna kadrumo en-  
viciĝis nia 12-a al la ĉeno de niaj pli  
kaj pli atentitaj jarkunvenoj. Kvankam  
kolego Gießner en siaj lastaj vortoj,  
kiujn kiel prezidanto de GEFA li parolis  
antaŭ la publiko de la festvespero, no-  
mis ĝin cezuro en la historio de la asocio,  
tamen la ŝanĝo en la estraro ne havis  
dramen aspekton. Sole pli-malpli ad-  
ministracia procedo, kaŭzita de konata  
nova konstelacio en la estraro de nia  
internacia organizo, celis pli larĝan div-  
idon de taskoj kaj respondecoj.

La komisiitoj kaj estraranoj de GEFA  
principe plenumas tri funkciojn, kiuj  
kvazaŭ skizas laborprogramon de Ger-  
mana Esperanta Fervojista Asocio.

Unue, kaj eble plej grave, GEFA-estraro  
konsistigas la t. n. laborkomitaton ĉe la  
ĉefestraro de BSW (pli antaŭe nomata:  
faka konsilantaro aŭ konsilanta fak-  
komisiono) komisiita de la plej alta in-  
stanco de nia Socialorganizo. De 1950 tiu  
ĉi konsilantaro estas samtempe la kerno  
de GEFA-estraro kaj la ĉenero inter BSW  
kaj landa asocio.

Ĝi due reprezentas la landan asocion en  
la decidrajta organo de Internacia Fer-  
vojistia Esperanto-Federacio, en la komi-  
tato do, kiu estas alivorte la parlamento  
de IFEF. La landaj asocioj laŭstatute  
delegas po 200 membroj unu reprezen-  
tanton. La germana asocio aniĝas ĉi-  
tempe kun ĉ. 900 membroj individuaj kaj  
korporaciaj.

Tria funkcio plej ampleksa kaj plej vid-  
ebla por la membraro estas la tasko,  
gvidi la fervojistan Esperanto-organizon  
sur nacia tereno kies organoj estas nia  
Bulteno, la konferenco de la distriktaj  
komisiitoj kaj la jarkunveno. Per tiuj ĉi  
tri rimedoj GEFA klopodas kunigi ĉiujn  
esperantistajn fervojistojn de nia lando,  
interkontakti kun aliaj landaj asocioj,  
kun ceteraj esperantistaj kaj neesper-  
antistaj organizaĵoj. Specifa tasko estas  
propagandi Esperanton inter germanaj  
fervojistoj; ĝuste nun GEFA serĉas no-  
vajn vojojn de varbado, provas apliki  
modernajn metodojn, kiajn niaj profes-  
iaj varbfakuloj instruas al ni. Ne laste  
la Internacia Lingvo donacas al ni an-  
kaŭ eblojn varbi per ĝi por nia en-  
trepreno, la Germana Federacia Fervojo,  
kaj fine servi al ĝi per internacia vastigi  
de faka klerigado. Tian investadon re-  
pagos plialtigo de nia lingva reputacio,

kies ĉiaman renovigon ni tiel certe be-  
zonas, kiel la ĉiutagan panon.

Estu ni unue fervojistoj: korektaj kun-  
laborantoj kaj indaj reprezentantoj de  
nia firmao, nur poste adeptoj de la Inter-  
nacia Lingvo, ne kiel misiistoj pri mita  
seкто aŭ kolportistoj de malkara varo,  
sed senhezite kaj neŝancele praktikante  
la lingvon, kiam ajn prezentiĝas la okazo,  
ke en la momento de bezono ni fakte dis-  
ponas pri preta lingvo, pri kvazaŭ na-  
tura interkomprenilo, samrajta kun kiu  
ajn idiomo.

Kvankam ni fervojistoj reprezentas la  
plej grandan, la plej aktivan fakorgani-  
zon en la Esperanto-movado, ni tamen  
ne povas malhavi la favoron de grandaj,  
neesperantistaj asocioj, kiel ekzemple la  
sindikata movado, en kiu ni scias amik-  
ojn simpatiantajn kun niaj lingvo kaj  
internacia agado. Ni flegu tiajn kontakt-  
ojn kaj kiel eble plej intensigu ilin, ĉu  
per aktiva kunlaboro en tiaj organizoj,  
ĉu per respektiva priesperanta informado,  
kursoj aŭ, en taŭgaj okazoj, praktika  
demonstrado en ties rondoj.

Mi ne opinias min nova balailo, kiu laŭ  
konata proverbo bone balaas. Kontraŭe,  
almenaŭ en tiu ĉi afero mi sentas min  
sufiĉe konservativa por laŭkapable kaj  
konsekvence daŭrigi la vojon de mia  
antaŭulo en tiu ĉi ofico. Ne tial, ke mi  
lin ŝatas kiel kolegon kaj amikon, sed  
kun plena konvinko mi agnoskas lian  
celkonscian agadon por la kontinua  
evoluo de nia asocio. Ankaŭ pro tio ni  
estas kontentaj, ke la nunaj IFEF-prezi-  
danto kaj sekretariino plue kunlaboras  
en nia landa asocio, ĉar dum 12 jaroj ili  
nodis kaj plektis kontaktojn al la ĉef-  
estraro de BSW, kiujn ili kun singardo  
kaj takto utiligis por la progreso de nia  
movado.

Preskaŭ 12 jarojn kolego Gießner gvidis  
la sortojn de GEFA; jam antaŭe li aktivis  
kiel redaktoro de nia bulteno, kiel afer-  
gvidanto de nia asocio kaj kiel germana  
reprezentanto en la IFEF-organjo. Kanti  
lian laŭdon signifus: porti strigojn al  
Ateno! Ni kunlaborantoj spertis lian  
senlacan fervoron, lian eĉ infektan  
iniciaton, per kiu li energie realigis  
multajn ideojn: film- kaj diskopro-  
duktadon EFG, kronikon kaj amplek-  
san kolekton pri la historio de nia fak-  
organizoj, normigon de la fakprelega la-  
boro; ĉu menciĝi la lirikan ambicion, kiu  
donis al ni poemojn, multajn nialingvajn



modkantojn kaj modernajn tradukojn de popolkantoj; apud tio ĉio li ne perdis la rilatojn al la esperantuja ĉiutago: varb-prelegoj, informaj konversacioj, lingvaj kursoj. Ne eblas citi la sennombrajn aktivecojn. Jen fine — ne laste — la jarĉefkunvenojn, kiuj tiel grave kontribuis al publika kaj kompetentula agnosko ne nur pri nia faka movado.

Kun virinā ĉarmo kaj kamaradeca modesto, ĉiutempe preta doni sian labor-kapablon al nia komuna celo, malgraŭ personaj obstakloj, malsanoj, akcidento,

afliktaj eventoj familiaj, kuraĝe venkante sin mem, same dekdu jarojn senlace aganta kolege apud la GEFA-prezidanto: nian admiron kaj respekton meritas la sekretario, kiu nun, ankaŭ promociinte, lasis sian GEFA-oficon al juna, malnova aktivulo. Sinceran dankon pro tio, kion ambaŭ, sinjorino Kruse kaj sinjoro Gießner donis al GEFA kaj per tio al la tuta movado, gratulon al ili pri la novaj oficoj en IFEF kaj multajn jarojn da sukcesa kunlaboro deziras membroj, komisiitoj kaj estraranoj. Willli Brandenburg

## Centra Biblioteko

### Fino de la librolisto

#### R — Religio kaj Filozofio

- 1 La Sankta Biblio / Zamenhof 1954, 994 p.
- 2 La idolo plej longe vivante / Martinus 1961 100 p.
- 3 Logiko / Martinus 1962 204 p.
- 4 El la Biblio / Zamenhof 43 p.
- 5 La malgranda katekismo de Luther / Hoppe 1961 41 p.
- 6 Fermentario / Ferreira (trad. Menéndez) 1960 262 p.
- 7 La libro de Teo / Kakuzo (trad. Nakamura) 1965 132 p.

#### I — Por infanoj

- 1 La Marvirineto / Andersen 1962 54 p.
- 2 La novaj vestoj de la Imperiestro / Andersen 1964 52 p.
- 3 Fabeloj / Andersen (trad. Zamenhof) unua volumo 1965 238 p.
- 4 Fabeloj / Andersen (trad. Zamenhof) kvara volumo 1963 244 p.
- 5 Gaŭŝutun kaj Nannona (trad. Zensto) 1964 44 p.
- 6 Bonvolu esti mia amiko (porinfanaj teatraĵetoj) 1963 58 p.

#### S — Sociologio kaj Politiko

- 1 La landima problemo inter Ĉinio kaj Hindio 1963 133 p.

#### St — Lerno- kaj Studlibroj

- 1 Kurso de Andreo Cseh
- 2 Daŭriga kurso post Cseh-kurso 1957 57 p.
- 3 Deutsche Redensarten in Esperanto / Minor 1922 56 p.

- 4 Retoriko / Lapenna 1958 294 p.
- 5 Esprimo de sentoj en Esperanto / Privat 1957 61 p.
- 6 Plena gramatiko de Esperanto, unua kajero Kalocsay-Waringhien 1958 181 p.
- 7 Plena gramatiko de Esperanto, dua kajero Kalocsay-Waringhien 1964 181 p.
- 8 Esperanto-lernlibro (hispana) — du libroj entute 226 p.
- 9 Kiel aranĝi kursojn kaj grupvesperojn? / Wingen 49 p.
- 10 La malgranda helpanto (instru- kaj legolibreto) 1936 48 p.
- 11 Esperanta lakto 16 p.
- 12 Konversacia literaturo — ok kajeroj —, entute 128 p.
- 13 Wir lernen Esperanto / Wingen 1960
- 14 Lehrbuch der Weltsprache Volapük / Schmidt 1933 36 p.
- 15 Piručnik za Konverzaciju (5 lingvoj) 1965 39 p.
- 16 Universala skribo/Halvelik 1966 128 p.
- 17 Lehrbuch der Welthilfssprache Esperanto / Schalmay 86 p.
- 18 Ekzercaj taskoj por daŭrigaj kursoj / Cseh 17 folioj.
- 19 Demonstraciaj tabeloj pri la konstruo de Esperanto, 8 tabeloj

#### V — Vortaroj

- 1 Plena vortaro de Esperanto 1960 574 p.
- 2 Fervoja Terminaro / Rosher 1953 67 p.
- 3 Fervoja Terminaro / Rosher (el UEA-Jarlibro 1952) 24 p.

## Faklingva Angulo

### redaktita de G. Ritterspach

Jen nova rubriko, kies titolo ne fortimigu vin! Ĝi estas destinita ankaŭ — eĉ precipe — por lingvaj ko-

mencantoj, sed ankaŭ progresintoj profite legos tie ĉi pri fundamentaj fervoj-fakaj nocioj, pri iliaj difinoj kaj eblaj derivaĵoj. Per kio ni komencu? Mi fermos la okulojn — jen kiel plej elstara vorto sin

altrudas „Gleiskrafttrottenzugkranwagen“, pro longeco! Inter la fervojaj objektoj montritaj en Bilder-DUDEN ĝi estas senkonkurenca, sed la Esperanto-tradukanto tute forrabis ĝian timigan literveston,



nomante ĝin simple „trakamioneto kun argano“. — Ni do serĉu alian komencon por la nova rubriko, pli simplan.

Relo — ŝpalo — trako, jen tri nocioj vere „fundamentaj“, eĉ en laŭvorta signifo. Ĉiu el vi scias, ke temas pri Schiene, Schwelle, Gleis, sed ĉu vi ankaŭ scipovus tuj diri difinon en Esperanto? Jen kion skribas la Plena Vortaro pri relo: „longa stango el metalo, sur kiu ruliĝas lokomotivoj, vagonoj, tramveturiloj“. Pli singarde

difinas Brockhaus: „eine Vorrichtung zur Führung eines Gegenstandes auf bestimmter Bahn“. Kaj germanlingva fervoja leksikono post simila difino aldonas: „paarig verlegt wird die Schiene mit Schwellen zum Gleis“. Ĉu tio kontentigas? Ni rigardu la Supplementon al PV. Sub trako ni legas „la du reloj, kun siaj ŝpaloj kaj akcesoraĵoj, de unu relvojo“. Kvar paĝojn antaŭe ŝpalo estas difinita kiel „transversa trabo el ligno aŭ alia materialo, sur kiu kuŝas la du

reloj de fervojo kaj al kiu ili estas fiksitaj“.

Ni okupiĝu ankaŭ iomete pri la nomitaj akcesoraĵoj: temas ĉefe pri la relfiksiloj (Kleineisenzeug), t.e. diversaj ŝraŭboj, boltoj, ringoj, la relsidplato (Unterlagplatte), la relsplintoj (Laschen), sed ankaŭ la kontraŭrampaj relankroj (Wanderschutzmittel) kaj eĉ unu nefera peco, la subrela plandumo (Zwischenschicht) el popla ligno, sinteza kaŭĉuko aŭ plasto.

(Daŭrigota)

## Geschäftsanweisung für die ZENTRALBÜCHEREI (Centra Biblioteko = CB)

der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW

### 1. Beschaffung und Katalogisierung

In jedem Jahr schafft jeder Bezirksbeauftragte aus Mitteln des Bezirks ein Buch an. Jedes Buch wird jeweils beim Beschaffungsbezirk inventarisiert. Sämtliche Bücher werden jedoch in das Bucherverzeichnis der Zentralbücherei aufgenommen und bei dieser beheimatet. Jedes nicht entliehene Buch befindet sich mithin bei der CB. Um zu verhindern, daß ein gleicher Titel mehrfach angeschafft wird, stellt der Arbeitsausschuß Esperanto jährlich einen Beschaffungsvorschlag zusammen, der so viele Titel umfaßt, wie Bezirksbeauftragte vorhanden sind. Die Bba können bis 31. 3. j. J. Wünsche für diesen Vorschlag an das Sekretariat schriftlich einreichen. Der Ausschuß vermerkt bei jedem Titel den beschaffenden Bezirk und stellt die Vorschlagsliste bis spätestens zur Jahresversammlung den Bezirksbeauftragten zu. Der Vereinigung geschenkte oder sonstige überlassene Bücher werden der Zentralbücherei übereignet.

### 2. Bucherverzeichnis der Zentralbücherei

Der Verwalter der CB führt das Bucherverzeichnis. Es ist nach Sachgebieten aufgegliedert, die durch große Kennbuchstaben und eine lfd. Nr. bezeichnet sind. Außerdem erhält jedes Buch einen zusätzlichen kleinen Kennbuchstaben, je nach

dem, ob es in erster Linie für den Anfänger oder Fortgeschrittenen geeignet ist (k = komencantoj, p = progresintoj). Die in der CB enthaltenen Bücher werden von Zeit zu Zeit im Bulteno bekanntgegeben, Neuerwerbungen regelmäßig zu Jahresanfang, wobei stets die kleinen Kennbuchstaben mit angegeben werden, z. B. (B/3 k).

### 3. Ausleihverfahren.

Die Bezirksbeauftragten und Gruppen erhalten jährlich eine bestimmte Anzahl von Bestellvordrucken zur Verteilung an die Mitglieder. Der Entleiher schickt seinen ausgefüllten Bestellvordruck an den Verwalter der CB, der ihm direkt das gewünschte Buch unter EDS (eingeschrieben) zustellt oder mitteilt, daß es im Augenblick nicht greifbar ist. Sofort nach Gebrauch hat der Besteller das Buch wieder direkt an die CB als EDS (Einschreiben) zurückzusenden. Auf dem Bestellvordruck setzt der Verwalter der CB eine Rückgabefrist fest und überwacht, daß das Buch rechtzeitig bei ihm wieder eingeht. Andernfalls wird das Buch zurückgefordert. Bei der Rückgabe mehrfach säumige Ausleiher erhalten keine Bücher mehr. Das Weiterverleihen an dritte Personen ist untersagt. Die Mitglieder unserer Vereinigung erhalten die Bücher grundsätzlich kostenlos ausgeliehen.



## La NOGELO — tago en Hannover

Nia koleginio Margarete Schmid el Augsburg partoprenis la NOGELO - tagon en Hannover kaj sendis raporton, el kiu ni publikigas la jenon:

Instigite de la pasintjara ligotago en Augsburg, niaj lingvoamikoj en Hannover aranĝis similan kunvenon la 7an/8an de oktobro 1968.

La kunvenejo „Künstlerhaus“, proksime de la stacidomo, donis indan kadron. Du Esperantoflagoj kaj tekstrubando sur la domfasado atentigis pri la aranĝo. Sub la protekto de ĉefurbestro August Helweg partoprenis ĉirkaŭ 100 esperantistoj el la nordgermanaj landoj Bremen, Hamburg, Niedersachsen kaj Schleswig-Holstein.

La prezidanto de la Esperanto-klubo Hannover kaj vicprezidanto de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI), sinjoro Müller, malfermis la kunvenon. Li kontaktis antaŭe kun diversaj lernejoj kaj certigis, ke li povas fari instrukciajn prelegojn. Post saluto de d-ro Bormann sekvis referato de d-ro Schlüter pri „la maŝina lingvo“. La resumo: Maŝina lingvo ne taŭgas kiel homa interkomprenilo. Ĝi estas lingvo per impulsoj, sed oni ne povas esprimi per ĝi la etoson kaj cirkonstancojn de la momento.

La venontjara aŭtunan nordgermanan labortagon invitis sinjoro Meyer al Bremen. D-ro Bormann rimarkigis: „Bremen estas ankoraŭ blanka makulo sur la verda Esperanto-mapo, sed ĝi nun verdiĝos“.

Viglan diskuton kaŭzis la decido de la Germana Esperanto Kongreso en München denove kongresi dum pentekosto (nun: pasko) venontan jaron. En Nordgermanio ne plu estas pentekostaj ferioj. Ankaŭ la francaj gastoj protestis, ĉar en Francio la pentekosta lundo ne estas festotago. Tamen por la venontjara komuna franca-germana kongreso en Straßburg estas fiksita pentekosto (intertempe: pas-

### Adoptu kolegojn por IFEF

Lingvajn limojn ni povis forigi; helpu al IFEF nun venki la valutajn barojn! Multaj gekolegoj en orienteŭropaj landoj, ankaŭ en Hindujo, Maroko k. a. ne disponas pri rimedoj por transpigi kotizojn al okcidenta lando. IFEF ĉie devus starigi kernon, el kiu povas evolui landa asocio. Kvankam laŭpove IFEF ĉien sendas sian organon,

tamen por multaj kolegoj estus honoro, fariĝi membro, kio sendube aktivigus ankaŭ ilian agadon por la Internacia Lingvo.

La IFEF-estraro vokas al solidareco kun niaj fervojistaj kolegoj en la t.n. nepagipovaj landoj. Donu vian adoptan promeson por 2—3 jaroj. Imagu, ke per bagatela ofero, per rezigno je kelkaj cigaredoj aŭ frandaĵoj vi povas fari

ko), sed tie certe oni pritraktos tiun temon denove.

La teatra grupo Hamburg ĝojigis dum unu horo per vere majstre ludita komedio de L. Dilling „La porcio da glaciaĵo“ (Fund. Krestomatio). La teatraĵo havas altan nivelon. Kelkfoje mi jam havis la plezuron vidi ĉi tiun laikoteatran grupon kaj ĉiam denove mi estas entuziasmigita. La redaktorino de „Heroldo“, sinjorino Ada Fighiera-Sikorski, partoprenis la tutan labortagon.

La temo de la germanlingva festparolado de d-ro Bormann estis „Homaj rajtoj kaj la lingva diskriminacio“. Kvankam ni kiel esperantistoj jam sufiĉe multe aŭdis pri tio, mi donas etan ekstrakton: Nia Federacia Respubliko estas la sola lando, kiu havas en sia konstitucio la deklaron de samrajteco. Sed por havi ordon, ĉiu libereco havas limojn. Por la tuta vivo ni estas ligita al la raso, la nacio, la sekso kaj la haŭtkoloro. Ĝis certa grado, laŭ la kapabloj, diligentece, oni povas ŝanĝi la influon de la naskiĝo kaj de la deveno. La unuopaj homoj mem povas decidi pri la limigoj kaŭzitaj de la religio, politika direkto kaj lingvaj bariloj. Viktimoj de la lingva diskriminacio estas ĉiuj nacioj, kies lingvon oni ne parolas en la grandaj internaciaj gremioj. Ĉar ni ne uzas la Internacian Lingvon perdiĝas multaj gravaj sciencaj esploroj. El la diskriminacio de lingvo sekvas ankaŭ la sciencia kaj la ekonomia diskriminacio. La finaj vortoj estis direktitaj al la Esperantistaro: Vidu ĉiam nian grandan komunan celon, sed ne havas sendan daŭre laŭte postuli la agnoskon de ĝi. Paŝon post paŝo ni devas iri kaj plenumi la ofte tiel penajn ŝajne malgravaĵajn taskojn.

Ĉies plaĉon trovis la ekskurso al la barokĝardeno Herrenhausen je la fino de tiu labortago.

amikan servon al kolego kaj grave kunhelpus al evoluo de IFEF.

Uzu multnombro la eblecon pagi al Konto n-ro 953 729 de la Eisenbahn-Sparkasse Frankfurt/Main kun aldone „IFEF/adopto“ la sumon de 3,50 GM po unu kolego kaj po unu jaro. Dankon por via komprenemo.

GEFA-estraro



## Aus den Gruppen

### Essen

Die Jahres- Hauptversammlung wurde am 16. 12. 1968 in Dortmund durchgeführt. Im Anschluß hieran besuchten die Teilnehmer gemeinsam die Rheinisch-Westfälische Auslandsgesellschaft. Kollege Schindler (Wuppertal) führte einige Dia-Serien von Teilnehmern des 20. IFEF-Kongresses in Varna vor. Die zahlreichen Teilnehmer bekundeten ihr lebhaftes Interesse an den Darbietungen.

### Köln

Die traditionelle Zamenhof- und Weihnachtsfeier der Esperanto-Vereinigung Groß-Köln wird alljährlich auch von GEFA-Mitgliedern gerne besucht. Der Gastgeber hatte zum 15. 12. 1968 in das Vereinslokal Venloerstraße eingeladen. Über 4 Stunden dauerten die mit Freude und Interesse von allen Beteiligten aufgenommenen Darbietungen. Den Festvortrag hielt der Vorsitzende der Deutschen Esperantojugend, Herr Uwe Moritz.

### Stuttgart

Am 4. 11. 1968 sprach Herr Khalchal, Mitarbeiter der „Rude Pravo“ in Prag, über „Die Tschechoslowakei heute“. Da uns der Besuch leider nur sehr kurzfristig bekannt war, konnten wir nur bei Dienststellen in Stuttgart auf den aufschlußreichen Vortrag aufmerksam machen. Doch in Anbetracht des aktuellen Themas konnten wir außer zahlreich erschienenen Mitgliedern auch Gäste begrüßen. Der Vortragende machte u. a. auch auf das im kommenden Jahr stattfindende Internationale Esperanto-Zeltlager in seinem Heimatland aufmerksam und gab der Hoffnung Ausdruck besonders auch Eisenbahner-Kollegen aus der BRD begrüßen zu können.

Einen Informationsabend veranstalteten wir am 11. 11. 1968 um 17.30 Uhr im Nebenzimmer der Kantine Stuttgart-Hbf. Im Mittelpunkt des Programms stand ein Farblichtbildervortrag über die Europa-Ferienwoche am Thuner See (Schweiz, August 1968), die von der Schweizer Landesvereinigung des Internat. Eisenbahner-Esperanto-Verbandes geleitet wurde. Die gelungenen Aufnahmen aus der zauberhaften Schweizer Bergwelt fanden ungeteilten Beifall.

Anschließend unterrichtete der Beauftragte die erschienenen Gäste über sprachliche Fragen und wies besonders auf die zahlreichen Möglichkeiten hin Esperanto in der Praxis zu erleben, sei es bei der im Februar 1969 wieder stattfindenden Eisenbahner-Esperanto-Skiwoche in Österreich, beim deutsch-französischen Kongreß Ostern 1969 in Straßburg, beim IFEF-Kongreß im Mai 1969 in Avi-

gnon oder bei persönlichen Begegnungen im Ausland, nicht zu vergessen die täglichen Esperantosen- und europäischer und außereuropäischer Radiostationen. Die Vorführung neu herausgekommener Esperanto-Schallplatten fand ein positives Echo. Zum Gedenken des Jahres der Menschenrechte wurden Mitglieder, Freunde und Gäste zu einer Veranstaltung in die Gaststätte Eduard-Pfeiffer-Haus in Stuttgart am 14. 12. 1968 eingeladen. Der Aufruf zu einer Spendenaktion für ein Blindenhilfswerk in Ostafrika und ein Kinderhilfswerk in Vietnam fand ein freudiges Echo.

### Wuppertal

Die Gruppen Schwelm und Wuppertal veranstalteten wiederum in Wuppertal-Barmen ein gemeinsames Zamenhof- und Weihnachtsfest mit Überraschungen und Verlosungen. An der gut besuchten Feier nahmen zahlreiche GEFA-Mitglieder teil. Die örtliche Presse brachte objektive Berichte über unsere gemeinsame Arbeit.

Die diesjährige Jahreshauptversammlung wird am 10. 2. um 17.45 Uhr in Hagen im Unterrichtsraum des Hauptbahnhofs stattfinden. Der Bezirksbeauftragte berichtet über die Arbeit im Bezirk und die wichtigsten Ereignisse bei den Landesverbänden. Der Arbeitsplan 1969 soll besprochen werden. Letzte Informationen über den bevorstehenden 21. IFEF-Kongreß und die Vorführung einiger Dia-Serien aus verschiedenen Kongreßländern versprochen einen interessanten Abend, zu dem hiermit eingeladen wird.

En la fervoja informilo „Amtsblatt der BD Wuppertal“ troviĝas en nro 40/68 detaloj pri novaj kursoj projektitaj en ses lokoj kaj antitigoj pri la venontaj IFEF-kongresoj.

**Novaj membroj** estas necesaj por fortigi nian movadon. Sed estas malfacile, interesi kolegojn. Se ni neniam parolas pri Esperanto kune kun kolegoj, ni tute ne sukcesos. Estas grave, ke ni tre ofte inter la kolegoj rakontas pri la persona Esperanto-vivo. Sed se ni volas paroli pri novaĵoj el la privata Esperanto-vivo, tiam ni devas nepre skribi regule al eksterlandanoj. Nur per tio ni ricevas ofte poŝtaĵojn. Tial la grava tasko de ĉiu vera esperantisto: Skribu minimume dufoje en ĉiu semajno al geamikoj. Sed komencu tuj! Vi havos certe riĉan rikolton, kaj vi povas rakonti tre interesajn aferojn el la tuta mondo. Ankaŭ vi povas montri al la kolegoj bele afrankitajn poŝtkartojn kaj leterojn. Per tiu vi farbas bone por nia amata Internacia Lingvo.

- roe -

## Kongreß-Kalender 1969

9. u. 10. internationale Eisenbahner Esperanto-Skiwochen vom 15.

bis 22. 2. und 22. 2. bis 1. 3. in Werfenweng/Osterreich.

21. IFEF vom 17. bis 23. 5. in Avignon/Frankreich.

1. französisch/deutsch vom 4. bis 8. 4. in Straßburg/Frankreich.

54. UK vom 26. 7. bis 2. 8. in Helsinki/Finnland.

42. SAT vom 3. bis 8. 8. in Novi Sad/Jugoslawien.

13. GEFA-Jahresversammlung im Oktober in Augsburg.

Im Rahmen des 12. Internationalen Seminars der Deutschen Esperantojugend, die vom 27. 12. 1968 bis zum 3. 1. 1969 zum zweiten Male in der Jugendherberge Köln-Deutz veranstaltet wurde, fand die am 28. 12. 1968 durchgeführte Frage- und Diskussionsstunde besondere Würdigung in der regionalen Presse und im Fernsehen.

Die Revelo-Jahresversammlung findet am 16. 3. 1969 in der Gaststätte Gilrath in Solingen statt. GEFA-Mitglieder sind hierzu herzlich eingeladen.

Nach der Neuorganisation des GEFA-Vorstandes traf sich der Arbeitsausschuß unter Leitung des 1. Vorsitzenden am 14. 12. 1968 in Dortmund zu seiner ersten Besprechung. Die umfangreiche Tagesordnung wurde in 8 Stunden erfolgreich abgewickelt. Die Möglichkeit der Mitgliederwerbung wurden eingehend besprochen.

### Panorama

Im Verlag Artur E. Iltis Fotopres erschien soeben „Dr. Esperanto: Internationale Sprache“. Vorrede und vollständiges Lehrbuch. Warschau 1887. 48 Seiten als Fotodruck zum Preise von 4.— DM. Reinh. Hauptenthal, 6603 Sulzbach, Am Bahndamm 12, nimmt Bestellungen entgegen.

Durch besonderes Rundschreiben wurden die Jugendlichen unserer Vereinigung nochmals auf die Internationale Eisenbahner-Esperanto-Skiwoche 1969 hingewiesen. Weitere Auskunft erteilt der Beauftragte für Jugendangelegenheiten der GEFA Günther Doliwa, 3031 Cordingen, Borger Str. 11, an den auch die Anmeldungen zu richten sind.

Die Esperanto-Redaktion des polnischen Rundfunks in Warschau fordert zu einem Esperanto-Wettbewerb auf. Die Teilnahmebedingungen sind beim Veranstalter zu erfragen. Einsendeschluß ist der 31. 1. 1969.

### deziras korespondi

Korespondadon kun germanaj gervojistoj serĉas s-ro Sláva David, Pustějov č 190, okr. Nový Zičín/Ĉeĥoslovakio. Temas pri fervojo, ĝardeno kaj naturo.

S-ro Richard King, 3, St. Helen's Rd., Harrogate/Yorkshire (Britujo) sesdekjaraga, stacioestro, volas korespondi kun germanaj gervojistoj.



# Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanta Fervojista Asocio en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojto

Stato: Januaro 1969

## Estraro

Prezidanto: tBOI Brandenburg, Hbm Münster (Westf.); Basa 945/397 aŭ 1391

Vicprezidanto: BAmtm Gießner, Bf Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

Unua sekretario: BI Rösemann, GV Osnabrück; Basa 945/822/357  
Dua sekretario: BOS in Kruse, Sozialamt Frankfurt/Main; AA 511; Basa 955/5615

Redaktoro: BAmtm Graß, BD Wuppertal -T-Büro T 101; Basa 946/468 aŭ 1407, privata adreso: 565 Solingen 11, Meteorstr. 13

Kasisto: BHS Jentsch BA Darmstadt; Basa 955/866/1124

## Apertaj komisiitoj

Lingvaj ekzamenoj: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

Instruado: BOAmtm a. D. Jäger, 6 Frankfurt/Main, Felix-Dahn-Str. 6; poŝtelefono 515123

Fakterminaroj: BOI Ritterspach, Tarifamt Frankfurt/Main, AA TA 40; Basa 955/2239

Varbado: BOS Dickel, Bf Lünen-Süd (Essen); Basa 944/806/35

Junularaferoj: BOS Doliwa, Ga Walsrode über Hannover; Basa 949/898/38

Biblioteko kaj gazetkolektado: BI Rösemann, GV Osnabrück; Basa 945/822/357

Bulteno-dissendo: BOS Schindler, Bf Schwelm (Wuppertal); Basa 946/848/126

Arkivo; BS Barmaneter, Bf Woringen (Schwaben); Basa 964/824/365

## Distriktkomisiitoj

Augsburg: B. Arb. Schmid; Basa 964/1745 aŭ 965/1318 (edzino Schmid)

Essen: BOAmtm Schmetzer, Bf Hamm (Westf.); Basa 944/807/391  
Frankfurt/M: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501

Hamburg: BAmtm Lepke, BD Hamburg — B-Büro —; Basa 947/5569

Hannover: BOS Heimlich, Bm Soltau; Basa 949/850/127

Karlsruhe: BOI Hug, BD Karlsruhe — Ps-Büro —; Basa 953/5005  
Kassel: BOS Tasler, BD Kassel — Ps-Büro —; 957/2158

Köln: BOS Mester, Ga Rheydt Hbf; Basa 943/882/75/105

Mainz: Gep.Arb. Hans, Gepa Neustadt / Weinstraße; Basa 954/866/1124

München: Olokf Gißibl, Bw Garmisch-Partenkirchen; Basa 962/821/355

Münster: BAmtm Schrappe, BD Münster (Westf.) P-Büro — P 2; Basa 945/1171

Nürnberg: BOS Müller, Bahnpolizeiwache Bamberg, Bp-Posten Lichtenfels; Basa 966/844/388

Regensburg: tBOI König, AW Weiden; Basa 965/829/622

Saarbrücken: BOS Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hgbf; Basa 956/5429

Stuttgart: BOI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —; Basa 952/5625  
Wuppertal: BAmtm Graß, BD Wuppertal — T-Büro T 101 —; Basa 946/468 aŭ 1407

## Peto al la eksterlandanaj gemikoj!

Ĉi supre ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estranaroj kaj de la distrikta komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garanti la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia Bulteno, ni urĝe petas informi nian unuan sekretarion, s-ro Otto Rösemann, Generalvertretung der DB 45 Osnabrück.

## Mitteilungen des Vorstandes

### Jahresbeitrag

Unsere Vereinigung und vor allem IFEF sind auf Ihren Jahresbeitrag angewiesen. Bitte, überweisen Sie diesen baldmöglichst an Ihren zuständigen Bezirksbeauftragten, dem Sie auch mitteilen wollen wohin Bulteno und LIF zu senden sind, falls sich in der Zwischenzeit Ihre dienstliche Anschrift geändert hat. Die Bezirksbeauftragten werden gebeten den Gesamtbetrag bis Ende Juni 1969 auf das Konto Nr. 953 729 der Eisenbahn-Sparkasse Frankfurt/Main mit dem Kennwort: Jahresbeitrag GEFA/IFEF zu überweisen. dem GEFA-Kassierer sind die neuen Mitgliederzahlen bis Ende Januar 1969 mitzuteilen, um eine ordnungsgemäße Zuteilung unseres internationalen Verbandsorganes sicherzustellen.

Redaktionsschluß für die Ausgabe 2/1969 ist der 15. 2. 1969.

## Informoj

21. IFEF-Kongreso vom 17. bis 23. 5. 1969 in Avignon/Frankreich

Korrespondenzanschrift  
21a IFEF-kongreso, 15 rue Guillaume Puy, F 84-Avignon.

### Anmeldeformulare

wurden durch die Bezirksbeauftragten verteilt. Nachforderungen nur über Korrespondenzanschrift.

### Anmeldung

unmittelbar über Korrespondenzanschrift bis spätestens 20. 4. 1969

### Bankkonto

Banque Nationale de Paris, 29 Rue de la République, F 84-Avignon, zugunsten „CH 072.574 - Congrès des Cheminots Espérantistes“

### Postcheckkonto

Banque Nationale de Paris. Konto-Nr. 13.381-Marseille zugunsten „Compte CH 072.574-Congrès des Cheminots Espérantistes“

### Geldüberweisung

unmittelbar an die Bank oder deren Postcheckkonto (evtl. über die Sparda oder eigenes Postcheckkonto).

### Kongreßbeitrag

bis 15. 1. 36 ffr, bis 15. 3. 44 ffr, später 50 ffr. Für Pensionäre, Ehefrauen und Jugendliche unter

28 Jahren gelten jeweils die Hälfte dieser Beträge.

### Klebemarken

Anforderung unmittelbar über Korrespondenzanschrift. 1 Klebemärke kostet 0,10 ffr + Porto.

### Kongreßgebäude

Palais de Champfleury, Avignon.

### Weitere Angaben

über Kosten für Unterbringung und Ausflüge bitten wir dem Anmeldeformular sowie den Veröffentlichungen im Verbandsorgan „La Internacia Fervojisto“ zu entnehmen.

### Dia-Serie

Die Esperanto-Gruppe Avignon hat eine Bildserie von Avignon und Umgebung mit entsprechenden Erläuterungen zusammengestellt. Die Sammlung ist zur Werbung bei unseren Mitgliedern gut geeignet und kann bei Bedarf angefordert werden. Anschrift: S-ino Humm, Chemin des Neuf Peyres, F 84-Avignon.

### Anoncoj

Tutkore ni dankas pro ĉiuj salutoj kaj bondeziroj, kiuj atingis nin, ĉefe la redakcion, okaze de la pasintaj festotagoj. Germana Esperanta Fervojista Asocio

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).  
Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck/preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.